Kvankam nuntempe estas multe da entuziasmo en la junulara movado, JEB ripetfoje trapasis longajn periodojn de neagado. Ni agnoskas, ke ni devas daŭrigi tiun ĉi nivelon de intereso kaj plu aktive serĉi



De maldekstre, Tom Shorney kaj Brian O'Sullivan

novajn membrojn el ĉiuj partoj de la lando, antaŭ ĉio, tiujn pli junajn por ke la asocio kontinuu longtempe. Nun JEB havas ĉirkaŭ 20 membrojn, de 17- ĝis 27-jaraj. Kaj nia membraro ankoraŭ kreskas – ni ricevis nian plej novan aliĝinton hieraŭ, do, se ni ne memkontentiĝas, kaj kun la helpo de EAB, ja eblas, ke la brita asocio estontece iĝos tiel granda kiel tiuj eksterlande! Kiel iu diris al mi, kiam mi estis en Francio, la grandigo de asocio okupas multe da tempo, kaj foje estas malfacile, sed persistu, ĉar ĉio bonos finfine. Kun tiu penso, ni daŭrigos.

Membership is completely free and open to everyone aged between 16 and 30 living in Britain. Join JEB by using the Aliĝilo on our website. www.novajeb.org.uk; e-mail: jeb@novajeb.org.uk.

Daniel White

New wheeze for publicity?

Dear editor,

Are you aware that on the website 'Read It, Swap It' – www.readitswapit.co.uk – you can list any books you wish to swap with others? If a swap is agreed the only cost you pay is posting the book to the other person. I have about a dozen or so books listed for swapping – among them *Teach Yourself Esperanto*. I have had two requests for the book. I refused the first because the person had nothing else I was interested in, but have accepted the second swap.

The system works really well – it would be nice if we could get a few members using it to not

only publicise Esperanto books but maybe also swap Esperanto titles with each other.

Paul Hewitt



Familiaj retpaĝaroj kun Esperantlingva versio

Estimata redaktoro,

Dum la pasintaj 500 jaroj loĝantoj de Eŭropo multe migris pro religiaj, ekonomiaj kaj politikaj kaŭzoj. Loĝante en nova medio, postaj generacioj rapide akceptis novan lingvon kaj ne interrilatis kun parencoj en la malnova lando. Nun dank' al la interreto oni povas rapide restarigi rilatojn inter branĉoj de la sama familio loĝantaj en malsamaj landoj – tamen restas la lingva problemo.

Multaj konstruas familiajn retejojn kun gastlibroj. Tion rimarkis esperantistoj el Silezio kaj kreis multlingvajn retejojn: Foraj kuzoj el Eŭropo ĉe <http://worsten.org> kaj Eurogento ĉe <http://eurogento.org>.

Esperantistoj povas eluzi la fenomenon por popularigi la Internacian Lingvon. Por tion fari, ni devas ne stari ekstere kaj mentori: 'Se vi akceptos Esperanton, tiam vi solvos viajn lingvajn problemojn', sed ni mem devas konstrui familian retejon kaj per ekzemploj kaŭzi modon, laŭ kiu ĉiu familia retejo posedu Esperantlingvan version.

Por esperantistoj, kiuj ne mem scipovis redakti familian retejon, ni helpis kaj disponigis spacon en la servilo eurogento.org.

Ni konstruis retpaĝarojn kun Esperanta versio ankaŭ por dek personoj, kiuj ankoraŭ ne komencis lerni la lingvon. Ili troviĝas en la sama servilo eurogento.org. Se vi posedas informojn pri familiaj retejoj de esperantistoj en aliaj serviloj, bonvolu sendi al ni la adresojn, por ke ni listigu ilin en niajn 44 landajn listojn de familiaj retejoj. Ni helpu unu al la alian konstrui familian retpaĝaron kun Esperantlingva versio.

Edward Wojtakowski,
Wroclavo (Silezio, Pollando)

Liro–2006

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn partopreni en la tradicia literatura konkurso Liro. Ĝi havas kvin branĉojn.

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: Porinfanaj poemoj de Agnija Barto, okaze de ŝia 100-jara jubileo
4. Traduka prozo (el la rusa lingvo): *Medved' na vojevodstve* de Miĥail Saltykov-Ŝĉedrin
5. Traduka prozo (el la angla lingvo): *A Diagnosis of Death* de Ambrose Bierce.

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 15-a de oktobro 2006.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso: sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2006. La organizanto ĝis la 1-a de januaro 2009 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevita konkursaĵo en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2006

- **DVD de EEU pri**

- **'Kia povus esti Eŭropo'**

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), al kiu EAB estas aliĝinta, esperas produktigi filmon kun la titolo 'Kia povus esti Eŭropo' (vidu artikolon pri la kampanjo en *Eŭropa Bulteno*, n-ro 40 (www.lingvo.org/bulteno). Por ke la projekto estu finita ĝis printempo 2007, oni devas certigi kolektitan monon de proksimume 15 000 eŭroj ĝis aŭtuno 2006. Oni planas eldoni la filmon en mil ekzempleroj, por disdoni 736 ekzemplerojn al eŭropaj parlamentanoj, kaj ĉiu donacinto de pli ol 50 eŭroj ricevos unu ekzempleron. Inter la landaj asocioj de UEA, EAB ĵus decidis kontribui 500 eŭrojn.

- **Gerda malaperis kiel filmo**

Jam estas preta la retpaĝaro de *Gerda malaperis – La filmo!* Oni povas viziti ĉe www.imagufilmo.org, kie troveblas novaĵoj pri la filmado de la verko de Claude Piron. Eblas antaŭmendi ekzemplerojn de la DVD, kiel ankaŭ sugesti, opinii, kritiki kaj iel kunlabori por la projekto. Oni petas ĉiun esperantiston disvastigi la novaĵon inter la geamikoj. La informojn sendis Karen kaj Joe, Imagu Filmoj (retpoŝte: amiko@uai.com.br).

- **More new members**

You will notice there are more new members of EAB under 'Membership' this quarter (see page 20). The new website option to purchase on-line (see page 15) seems to be a contributory factor. Congratulations and thanks to all who have made this possible.

- **Florenca UK havas jam pli ol 2 000 aliĝintojn**

La 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco (29 julio–5 aŭgusto 2006) estos la tria sinsekva UK kun pli ol 2 000 aliĝintoj. Jam la 8-an de junio ĝi arigis 2 039 aliĝintojn el 61 landoj. Francio persistas ĉe la pinto. En la plej freŝa nombrado ĝi reprezentigas kun 283 personoj, dum Italio liveris 254. El Japanio venos tre granda grupo por bonvenigi la kongres-

Fotis Zsofia Korody



Dek naŭ junaj gelernantoj de Esperanto en lernejo de Herzberg, Germanio, kun sia instruisto Otto Kern

- **Instrua kunlaboro germana-pola**

Ĉiuj lernejoj en Herzberg, Germanio, volas oferti Esperanto-kursojn, kaj la gimnazio alstrebas multjaran projekton. Nun okazas instruado de Esperanto en naŭ – etaj ĝis grandaj – lernorondoj, ĉefe en la lernejoj. Same oni instruas en ilia pola ĝemelurbo Gora (en Malsupra Silezio), kie junaj instruistinoj instruas al lernantoj en baza lernejo, gimnazio kaj liceo. Ankaŭ la direktorino de la liceo eklernas Esperanton. Oni volonte akceptas salutmesaĝojn por transdoni kaj al la lernejoj kaj al la gelernantoj: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz. Tel. +49/(0)5521-5983; rete: esperanto-zentrum@web.de; ttt-paĝaro: www.ic-herzberg.de).

La 9-an de marto venis grupo de la fakaltlernejo en Mittweida, Saksio, por filmi la instruadon ĉe gelernantoj el surloka bazlernejo. La saksa regiona televido elsendis la filmon en aprilo. Regiona gazeto frontpaĝe informis pri la evento. Rezulte de publika informado ne malmultaj homoj demandis pri Esperanto-instruado en Herzberg.

Kelkaj pli aĝaj gelernantoj de Esperanto en Herzberg



anojn al la venontjara UK en Jokohamo: ĝis nun aliĝis 179 japanoj. La limon de 100 superas ankaŭ Germanio kaj Pollando, kun 156 kaj 124 aliĝintoj respektive. Rimarkinde multaj kongresanoj, 89, jam enskribiĝis el Rusio. Aliaj landoj kun pli ol 30 aliĝintoj estas Belgio (67), Brazilo (62), Hispanio (59), Litovio (50), Nederlando (43), Britio kaj Usono (po 42), Kroatio (40), Svedio (39), Ĉeĥio kaj Danio (po 38), Hungario (37), Svislando (36), Korea Respubliko (32) kaj Serbio (31). (Gazetaraj Komunikoj de UEA.)

• Kuriozaj italoj?

Ĉu vi aliĝis al la UK en Florenco? Se jes, eble interesas vin la sekvaj demandoj aŭ 'kuriozaĵoj' pri la kongreslando:

- En Italio la publikaj necesejoj maloftas. La problemoj tamen ne estas tiel gravaj, kondiĉe ke ...
- Kial la italoj emas trinki kafon (kaj ne nur kafon) starante? Ĉu nur pro hasto? Ĉu tio imitindas? Eble ankaŭ vi emus kelkfoje tiel konduti, se vi scius, ke ...
- En Florenco, kompleta adreso konsistas ne nur el: stratnomo, enirporda numero, poŝtkodo, ..., necesas precizigi, ĉu la enirporda numero estas ... nigra aŭ ruĝa. Ĉar, en ajna strato, povas ekzisti kaj la numero 10 nigra kaj la numero 10 ruĝa, ne ĉiam tiel

proksimaj ... Ĉu vi povas kredition? Kaj kiel oni orientiĝas?

• Ĝenerale, konsulti fervojhoraron en lando, kies lingvon oni ne konas estas kapdoloriga. Tamen eblas relative facile ĉerpi el la reta informilo de la Italaj Fervojoj ĉiun necesan informon pri ĉiuj trajnoj, kondiĉe ke ...

Se vin jukas tiuj demandoj (aŭ se vi bezonas fidindajn informojn pri trajnohoraro kaj -kostoj) povos vin grati la UK-paĝaro www.ukflorenco2006.it, se vi sekvos la jenan vojon: 'Utilaj informoj' → 'Atentigoj, aldonaĵoj, precizigoj, korektoj'. Tiu paĝo vizitindas de tempo al tempo, ĉar en ĝi kelkfoje frue aperas (eventuale provizorforme) informoj, kiuj poste definitiviĝos en sia pli konvena loko. (Laŭ informoj de Ranieri Clerici.)

• Esperanto-kursi en Svedio

Haveblas nova broŝuro pri la someroj kursoj de Esperanto ĉe la sveda Esperanto-domo en Lesjöfors, Vermlando, meza Svedio. Adreso: Esperanto-Gården, SE-680 96 Lesjöfors; tel. +46 (0)590 30909; rete: egarden@esperanto.se.

• Esperantologia Konferenco dum la Universala Kongreso

La Esperantologia Konferenco de la ĉi-jara Univerala Kongreso en Florenco (29 julio–5 aŭgusto)

havos kiel temon 'Esperantologio kaj la interreto'. Bonvenaj estos kontribuoj pri scienca pritrakto de Esperanto en la interreto kaj pri la interreto kiel helpilo por esperantologoj. La konferencon organizas Bertilo Wennergren.

ESF (Esperantic Studies Foundation), kiu subtenas la konferencon, planas aperigi la referaĵojn en sia ttt-ejo kaj eble ankaŭ en presita formo. Interesitoj bv. anonci sin ĉe Bertilo Wennergren retroŝte: bertilow@gmail.com.

• Instigaj rakontoj petataj

Enrique Ellemberg el Fremont, Kalifornio, informis, ke li verkas libron celotan al homoj, kiuj ankoraŭ ne malkovris la valoron de Esperanto. Li kolektas rakontojn de esperantistoj, kiuj travivis belajn okazaĵojn, kiuj ne eblus, se ili ne scipovus Esperanton. Bonvolu sendi vian rakonton al: Enrike@aol.com. Retaj detaloj troviĝas trilingve, Esperante, angle kaj hispane, ĉe: <http://esperantofre.com/book/libro47.htm>.

• Esperanto-kursoj ĉe afrikaj universitatoj

Esperanto-Kultura Movado (EKM) de Universitato de Kinŝaso ekokazigis kursojn de Esperanto. Tie de 1993 funkcias Esperanto-klubo. Antaŭ kelkaj monatoj okazis la antaŭprojekto, kiu temis pri instruado de Esperanto al deko da homoj, kiuj deĵoras kiel kurs-asistantoj de universitataj instruistoj. Poste oni planas sekvi per trejnado de instruistoj en dusemajna seminario. Lernomaterialoj jam venis donace, interalie el Belgio kaj Italio – kaj per tiuj lernolibroj multaj interesitoj (instruistoj kaj oficistoj) lernas aŭtodidakte. Ĉiusabate EKM organizas legorondojn por ĉiuj. Pliaj helpaĵoj estos bonvenaj pro daŭraj mankoj (adreso: DKEA, B.P. 761, Kinshasa XI, Demokratia Respubliko Kongo; rete al s-ro Emile Malanda ĉe prezidanto_dkea@yahoo.fr). Plie, dank' al s-ro Ntoto, meritplena konga esperantisto kaj magistro pri

Daŭrigo sur paĝo 19

Ne maltrafu la specialan oferton!

NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO

– nepre havinda de EAB kontraŭ nur £8 (inkl. de sendokostoj) –

Libro, kiun devus posedi ĉiu serioza esperantisto. Ĝi enhavas fundamentajn tekstojn, elektitajn de William Auld, laŭ la skemo de la originala *Fundamenta krestomatio* de L.L. Zamenhof. La rubrikoj estas: Ekzercoj, Rakontoj, Mondliteraturo, El vivo kaj sciencoj, Prilingvaj artikoloj, La Esperanta muzo, kaj Internacia liriko.

- EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887. Aŭ mendu rete ĉe www.esperanto-gb.org



On-line shopping now on the EAB website



The bookshop section of EAB's website www.esperanto-gb.org now lets you order on-line from our selection of Esperanto books, CDs, DVDs and sundries, paying for your order by credit or debit card. If you've bought goods using the internet before, then you'll probably find the shopping process familiar.

How to do it

In the Bookshop Catalogue page you can browse through the catalogue entries, jump directly to a catalogue section, or use your browser's 'find' command to search for a particular title or author. For most entries, you can click on the title to see an illustration.

For each item that you want to buy, click on its [add to cart] link to put it into your virtual 'shopping cart'. When your cart contains all the items you want to buy, proceed to the 'Checkout', where you enter your name and address. You're then shown your complete order, with shipping charge and delivery details.

If you're happy with this order, proceed to 'Make Payment', where you enter your credit or debit card details. These are sent over a secure link directly (and only) to WorldPay, who handle the card transaction for EAB.

Note that your order is only submitted when you click on the final 'Make Payment' button. At any point before this you can cancel the shopping session without submitting the order.

After you submit your order you will receive an e-mail from the EAB shop, confirming your order details, and an e-mail from WorldPay, confirming the credit/debit card transaction.

Membership on-line too

The Membership page on the website also has some [add to cart] buttons, allowing you to

buy EAB membership or make a donation as part of your on-line order.

Of course, Viv is still happy to receive bookshop orders by post with payment by cheque if you

prefer to shop that way. And you are welcome to visit the bookshop in person – do please contact Viv in advance to confirm the opening hours.

Vilĉjo Walker

Novaj libroj kaj pli de EAB

• *Bonvolu aldoni 15 procentojn al ĉiuj prezoj por la sendokostoj.*

Esperanto – a Language for the Global Village Sylvan Zaft . In English, packed full of examples and information presenting Esperanto. Calgary, 2002 15 pages. £9.45

Esperanto sinonimoj Jaan Ojalo. 5 500 words listed to help enrich your everyday written and spoken Esperanto. £5.00

Hobito aŭ tien kaj reen, La J.R.R. Tolkien. Trad. C. Gledhill, kaj W. Auld (poemoj). Mirfabelo de la aŭtoro de *La mastro de l' ringoj*. Kaliningrado, 2005 (2a eld). 224 paĝoj. £12.60


Nanatisis Robert Dutil. Tradukis Esperanto-Societo Kebekia. Ĉarma mirrakonto pri la aventuroj de soleca kanuisto en la nordamerika nordoriento. Montrealo, 2005. 114 paĝoj. £12.30

Manlibro pri instruado de Esperanto Ed. K. Kováts. Partizánske/Hago, 2005. Broŝ. 150 paĝoj. £5.50

Pasporta servo 2006 La listo de gastigantoj de TEJO, kun 1 320 adresoj en 92 landoj. Roterdamo: TEJO, 2005. 186 paĝoj. £10.50

Tradiciaj rakontoj Amika Esperanto-Rondo. Kelkdek tradukitaj rakontetoj. Inkluzivas KD-on. Beauville, 2003. 47 paĝoj. £5.90

Tradukarto kaj ties problemoj André Cherpillod. Konsiloj por eventualaj tradukantoj el la franca en Esperanton, kun ekzemplaj tradukaĵoj. La Blanchetière: Courgenard, 2003. 125 paĝoj. £7.99



Tria frato teoristo, La Jeronimas Laucius. Trad. el la litova. Detektiva rakonto en simpla lingvaĵo. Vilno, 2003. 16 paĝoj. £3.90

Veturu al Piedpilklando Jeronimas Laucius. Trad. el la litova. Kvazaŭmoko de la absurdo, kiun atingis la hodiaŭa sportado. Precipe, sed ne nur, por infanoj. Vilno, 2003. 16 paĝoj. £3.60

Vivo de Andreo Cseh Ed Borsboom. Hago: IEI, 2003. Ampleksa biografio de la kreinto de la rekta Ĉe-metodo. 313 paĝoj. £12.26

Freŝe alvenis ...

Plena manlibro de Esperanta gramatiko Bertilo Wennergren. Praktika konsultlibro kun klara prezento kaj multaj ekzemploj. 696 paĝoj. Vidu la anoncon sur paĝo 17. £16.50



Kompaktaj diskoj por somera aŭskultado ...

Amu Min Jomart kaj Nataŝa. 2003. Kantoj kaj tekstoj de Miĥaelo Bronstejn. £14.80

Kajto! La unua kolekto da kantoj de la populara nederlanda grupo Kajto. £8.00

Londono kantas Nove sur KD, 20 popularaj kantoj kantitaj de Londona Eo-Ĥoro. Inkluzivas 12-paĝan broŝuron kun la tekstoj. Londono: 1983. £4.00

Lokomotivo, rulu nun! Kantoj de la nederlanda grupo Kajto. £8.00

Masko Kantoj de la nederlanda grupo Kajto. £8.00

Plaĉas al mi Dek ses mezepok-stilaj muzikpecoj katalunaj, okcitanaj, andaluziaj k.a. £14.35

Proceso multkolora Kantoj de la nederlanda grupo Kajto, kune kun la tekstoj. £8.00

Rapida vojo Sylla Chaves. Enkonduko al Esperanto per kantoj, dialogoj kaj poemoj de la konata brazila poeto. 58 minutoj. (La akompanan tekstolibreton mendu aparte – vidu sube.) Nova £6.30


Rapida vojo S. Chaves. 12-paĝa broŝuro ĉe la samnoma KD. £2.31

Sojlo de la klara temp' Popolmuziko el Katalunio kaj Okcitanio laŭ mezepoka stilo. £12.40

Tohuvabohuo Kantoj de la nederlanda grupo Kajto, inkluzive de tekstlibreto. 60 minutoj. £8.00

Mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj el Ĉinio Prezentoj de ĉirkaŭ tridek mirindaĵoj de Ĉinio. Pekino: Ĉina Radio Internacia. £6.00

Kelkaj ne tiel novaj ...



Dekamerono Giovanni Boccaccio. Tradukis el la itala Paula Martinelli kaj Gaston Waringhien. LF-Koop, 1995. La unua triono de la fama mezepoka erotika rakontaro. 320 paĝoj. £21.50

Dulingve – pli simple E. Csiszar. Roterdamo, 1995. Pri denaska dulingva edukado, kie unu el la lingvoj estas Esperanto. 86p. £3.10

Kaj la ceter' – nur literaturo Gaston Waringhien. Kvina volumo de eseoj pri literaturo, literaturistoj, tradukado, arto k.a. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 350 paĝoj. £8.40

LIBROJ KAJ PLI

Itala Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj subtenas la italan kulturon en Esperanto

La italoj estas konindaj ne nur pro la bela klimato, la napolaj kantoj kaj la pico. Ili estas konindaj ankaŭ kiel 'popolo de la libro'. Temas pri la sola libro en Italio, pri kiu ĉiu scias. Kelkaj homoj memoras tutajn pecojn parkere. Ĝi eniris la lingvon per multaj dirmanieroj, kaj ĝiaj rolantoj – la kamparano, la trompema advokato, la bonegulo, la sanktulo, la malbonegulo – regule estas uzataj por priskribi nuntempulojn.

Ekkonu la italojn per *La gefianĉoj!*


La gefianĉoj (itale *I promessi sposi*) estas verko de Alessandro Manzoni, kiu verkis en la 19-a jarcento, kaj priskribis eventojn okazintajn antaŭ jarcentoj en norda Italio. Fakte temas pri la mistraktado fare de la tiamaj potenculoj al la tiamaj malpotenculoj kaj pri la rolo de la eklezio protekte al la popolo (eĉ se foje alianca kun la regantoj).

Ĝi aperis en la prestiĝa serio Oriento-Okcidento de UEA kadre de la laboroj antaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso en Florenco. Se vi volas koni la homojn en la kongresa lando, ne maltrafu ĝin.

Ĝi estas aĉetebla de Itala Esperanto-Federacio (rete: fei@esperanto.it) kontraŭ 27 eŭroj plus sendokostoj, aŭ ĉe la Libroservo de UEA (vidu la adreson sur paĝo 2).

Ministeria subvencio

La itala Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kadre de subteno de la itala kulturo eksterlande ĵus aĉetis de Itala Esperanto-Federacio 91 ekzemplerojn de *La gefianĉoj* en Esperanto, kiun ĝi nun plusendos al ĉiuj Institutoj pri Itala Kulturo Eksterlande. Esperantistoj, kiuj havas kontaktojn kun unu el ili, povos trovi ĝin tie. La aĉeto estas nereakta subvencio al la laboroj por la UK en Florenco. □



Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

This reference work has been available on the internet for more than 10 years, during which time the author has worked constantly on improving it. Now it is also available as a book with almost 700 pages.

Compared to *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* it is less theoretical and more practical: you do not need to be an expert Esperanto-speaker to understand and benefit from its clear explanations.

However, the book is also of interest to experts. The large number of real examples, with references, provides ample material for the most demanding of linguists.

Bertilo Wennergren:
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. El Cerrito: ELNA, 2005. 696pp. 16 x 23.5cm. ISBN 0-939785-07-2.

• **Order from EAB** for £16.50 (+ p.&p. at 15% £2.48) = £18.98.

EAB, Esperanto House,
Station Road, Barlaston,
Stoke-on-Trent
ST12 9DE (tel. 0845 230
1887) or online at
www.esperanto-gb.org

Fratoj Leonkoro, La Astrid Lindgren. Tradukis el la sveda K. Rohdin. Högsby: 1987. Konata porinfana rakonto, kiu ekzistas ankaŭ kiel svedlingva filmo. 128 paĝoj. £4.80

Krabo kiu ludis kun la maro, La Rudyard Kipling. Tradukis A. Wandel. Edistudio, 1993. 28 paĝoj. £3.80

Kulturo kaj teknologio
A. Urevbu. Tradukis John Rapley. Referaĵo pri la jara temo por 1997 de la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo. Roterdamo: UEA, 1997. 63 paĝoj [ĉe UEA £4.70] £3.00

Laŭokazaj lingvaj notoj Avo (Alec Venture). Kolektitaj kaj laŭteme ordigitaj konsiloj el *The British Esperantist*. Londono, 1977. 95 paĝoj. £3.00

La luzidoj Luís Vaz de Camões. Tradukis el la portugala L.H. Knoedt. Unu el la plej ekscitaj eposoj de la monda literaturo, pri la portugala popolo. Fonto, 1980. 464 paĝoj. [ĉe UEA £19] £12.00

Nudpieda Gen Nakazawa Keizi. Tradukis el la japana Izumi Yukio. Bildstria romano pri familio, kiu spertis la eksplodon de la atombombo super Hiroŝimo. Tokio, 1985. [ĉe UEA £13.50] £9.00

Originala Esperanta bildvortaro Sylla Chaves. Tri mil bildigitaj vortoj, elektitaj kaj ordigitaj por maksimume internacia utilo. San-Paŭlo, 1993. 170 paĝoj. £7.50

Orm la Ruĝa Frans G. Bengtsson. Tradukis el la sveda B. Nilsson. Aventura kaj humurplena proza eposo pri la vikinga socio kaj la alveno de kristanismo. Malmö, 1989. 216p. [ĉe UEA £6.20] £3.50

Parnasa gvidlibro aŭ kiel fariĝi poeto K. Kalocsay, G. Waringhien. Kun analizo de metriko, valoraj konsiloj por poetoj kaj rimvortaro kun glosaro. Edistudio, 1984. 208p. [ĉe UEA £8.40] £7.00

Ruĝdoma sonĝo, Volumo I Cao Xueqin. Tradukis el la ĉina Xie Yuming. Aŭtobiografia verko pri ruiniĝo de nobela familio kaj tragedio de junaj geamantoj. Laŭ komuna agnosko, la plej grava ĉina romano. Pekino: 1995. 16+582 paĝoj. [ĉe UEA £14.60] £11.60

Ruĝdoma sonĝo, Volumo II. Cao Xueqin. Tradukis el la ĉina Xie Yuming. Pekino: 1996. 4+684 paĝoj. [ĉe UEA £18] £15.30


Salale! Farok Topan, Ebrahim Husein. Tradukis el la svahila Nino Vessella. Teatraĵoj. Du modernaj, socie engaĝitaj tanzaniaj teatraĵoj. Edistudio, 1984. 175 paĝoj. [ĉe UEA £6.20] £3.50

Vortoj de Andreo Cseh Sesdek ses diverstemaj, simplastilaj artikoloj de la fama pedagogo. Saarbrücken/De Bilt: Artur E. Iltis/Societo Andreo Ĉe, 1984. 208 paĝoj. [ĉe UEA £11.50] £7.00

Vivo de Lanti E. Borsboom. Biografia studo pri la fondinto de SAT, kun 70-paĝa aŭtobiografia teksto. SAT, 1976. 271 paĝoj. £8.70

Vojaĝo finiĝas, amantoj kuniĝas Manjo Austin. Romantika rakonto pri plenkreskiĝo en irlanda urbeto. Antverpeno: FEL, 1988. 128 paĝoj. £3.00

Zamenhof, Creator of Esperanto Marjorie Boulton. Anglalingva versio de la plej bona biografio pri Zamenhof. Londono: Routledge & Kegan Paul, 1980. 12+223 paĝoj. [ĉe UEA £8.30] £4.00



Come to the Autumn Meeting of the North-West Esperanto Federation

Why not pay a visit to one of our most active federations, on Saturday, 7 October, at the Eaton Hotel, City Road, Chester.

As usual, our Autumn Meeting will be at the Eaton Hotel, City Road, Chester, only five minutes' walk from the railway station. If you plan to come by car, please ask me to send you a map showing the most convenient car park. Visitors from regions outside the North West are particularly welcome.

Arrive from 11 am, first in the lounge, immediately on the left as you enter. You can buy prize raffle tickets and buy from a selection of used books, all in aid of Federation funds. Once everyone has arrived, around 12.30 pm, a full buffet lunch will be served in the adjoining restaurant, with suitable alternatives for vegans and vegetarians. Following lunch, there will be a

short committee meeting, after which our former president, Dr Paul Gubbins will be our guest speaker this year, in memory of Antonia Rostron Van Ess.

At this stage, one of several internationally famous Esperanto-speakers is hoping to be selected for this honour – more details nearer the time! Afterwards there will be a break for tea or coffee, the prize draw and finally conversation groups. We need to clear the restaurant by 5.30 so they can prepare it for dinner, but then we can move back to the lounge.

The charge is £8.50 for the lunch and afternoon tea or coffee. You may of course buy any other refreshments in the lounge bar.

Please send your cheque for £8.50, payable to I. Mac Dowall at 40 Danehurst Road, Wallasey CH45 3JJ, but I do need to let the hotel know how many we will be by 4 October at the latest. We look forward to seeing old friends and welcoming new ones! *Ĝis revido en Chester!*

Ian Mac Dowall
Secretary,

NW Esperanto Federation

Alĝu al nova grupo en Nottingham?

Helpu nin formi novan grupon en Nottingham. Se vi loĝas en aŭ apud la urbo, bonvolu kontakti Darren Lampon (101 Seymore Road, West Bridgford, Nottingham NG2 5EE. Tel. 0115 9743211) aŭ Bryan Ranwell (86 Quarry Hill Road, Ilkeston, Derbyshire DE7 4DA. Tel. 0115 9324393; rete: b.f.r@btinternet.com).

Ed Borsboom ĉe la Orienta Federacio

Ed Borsboom, el Nederlando, paroligis membrojn kaj vizitantojn pri Andreo Cseh ĉe la kunveno de Orienta Federacio la 20-an de majo.

Ed klarigis iom pri la vivo kaj instrumentado de Cseh, sed ĉefe konsilis pri Esperanta lingvo-uzado. Ekzemple: verku en frazoj ne pli ol dudek vortojn longaj. Kunmetu vorterojn por fari

novan vorton, jes – sed ne pli ol kvin silaboj. Evitu neologismojn – ĉiam kontrolu en vortaro, prefere *Plena ilustrita vortaro*. Foje oni supozas, ke vorto ne antaŭe vidita estas neologismo, sed je kontrolo eltrovas, ke ĝi ja estas Zamenhofa. Evitu troan uzadon de 'la' (la difina artikolo). En kelkaj lingvoj – la japana, ekzemple – ĝi ne ekzistas. Se 'la' ne absolute necesas, ellasu. Zorgu pri pronomoj. Ili estas nekonataj en kelkaj lingvoj. Do,

ne timu ripeti nomon de persono aŭ objekto en frazo, por fari ĝin tute klara. Klareco estas la celo de interparolado kaj skribado, ĉu ne? Verku simple, li konsilis.

Ed priskribis sian libron *Vivo de Andreo Cseh*, kiun li verkis laŭ la supraj reguloj. Li proponis liston de bonaj verkistoj, kiuj verkas simple kaj klare, inkluzive de Marjorie Boulton, William Auld, John Francis, Raymond Schwartz, Stellan Engholm – kaj li mem, kompreneble.

Aliaj eroj dum la kunveno inkluzivis lecionon de John Redgwell, promeno en Braintree gvidata de Roy Threadgold, kaj tagmanĝo por revivigli promenantojn. Post la prezento de Ed, homoj teame ludis lerte elpensitan krucvortenigmon de Roy Simmons. Kuko kaj teo fortigis por hejmeniro.

Dankon al la Orienta Federacio pro ĝinda tago. Ili bonvenigus vizitantojn al siaj kunvenoj: 27-a de aŭgusto en Nacton (pikniko), 28-a de oktobro en Maldon (Terry Page prelegos), 2-a de decembro en



Dum la promendo ekster preĝejo en Braintree. Ed Borsboom staras meze. Dekstre: Joyce Bunting prezentas la pokalon, kiun gajnis la grupo en Braintree en intergrupa konkurso. Gratulon!

Ipswich (Kristnaska Festo).
Pliaj detaloj haveblaj de: Roy
Simmons, Esperantujo, 12
Packard Place, Bramford IP8

4HA. Tel. 01473 461346;
retadres: rokeby@globalnet.
co.uk.

Joyce Bunting

focuses on the diverse peoples
and cultures of modern Europe,
published six times a year. For
more information go to www.hiddeneurope.co.uk. The maga-
zine also has a regular e-newslet-
ter, issued twice or thrice
monthly, to which you can sign
up for free on their website.

MALLONGE

IN SHORT

Daŭrigo de paĝo 14

juro, deĵoranta en tiu universi-
tato, stariĝos simila projekto ĉe
Universitato de Kongo en la
provinco Bas-Congo.

• **‘Esperanto, Kulturo kaj Progreso’ ĉe Mediteranea Maro**

Jen la temo de la 32-a Internacia Semajno de Esperanto, kiu okazos en Sète, apud Montpellier en suda Francio, de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto. Okazos plur-nivelaj kursoj, distraj vesperoj kaj ekskursoj. Petu aliĝilon kaj informojn pri la loĝebleco en granda parko 100 metrojn de mediteranea plaĝo. Retpaĝo: <http://perso.wanadoo.fr/esperanto.html>; retadres: jf.passarella@free.fr, aŭ Jean-François Passarella, ‘Esperanto, Kulturo kaj Progreso’, 5 rue du Dr Roux, FR-34090 Montpellier; tel/fakso: +33 (0)4 67 54 15 43.

• **Studtago honore al Bruno Migliorini**

Dum la Universala Kongreso en Florenco okazos studtago honore al Bruno Migliorini sub la temo ‘Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo’. Ĝin aranĝas kunlabore Akademio de Esperanto, la akademio de la itala lingvo (Accademia della Crusca), Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj Universitato de Florenco. Ĝi okazos en la Fakultato pri Literaturo kaj Filozofio de la Universitato la 28-an de julio. Oni antaŭvidas prelegojn de italaj lingvistoj en la itala kaj de esperantistaj interlingvistoj en Esperanto. Sin-anoncojn, kun aŭ sen prelegi, oni sendu al R. Corsetti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina.

• **Esperanto tuŝita en BBC2**

La 3-an de majo oni menciis Esperanton en televida programo de la kanalo BBC2. Temas pri programserio sub la titolo *Holidays in Euroland*. Prezentas Tim Samuels, laŭdire ‘por malkovri la

realojn kaj strangaĵojn de Eŭropo, i.a. por trovi eŭropan identecon’. Oni elsendas ekde 19h30. Oni provis alparoli eŭropan oficialulon pri Esperanto, sed la intervjuoto eskapis sen ion diri, post kio sekvis la komento: ‘Li ne volas paroli kun mi pri Esperanto’. Antaŭ tio okazis interparolo kun virino, kiu parolis kaj Esperante kaj angle (kredeble estis la pola MEP Margareta Handzlik).

• **Hidden Europe**

The hidden europe magazine is non-Esperantist publication that


• **Esperanto – front-page news in Lancashire**

On 18 May the *Lancashire Evening Post* carried a front-page article entitled ‘Saluton! Cu [sic] vi parolas Esperanton? (Hello! Do you speak Esperanto?)’. The excellent interview with Jim Voiels emphasised ‘equality of rights and tolerance’, and – importantly – included addresses of EAB websites.

• **Feature in Stone & Eccleshall Gazette**

An almost full-page article on Esperanto appeared in the June

Nekrologo



Dum celebri pri la vivo de **Eric McCanlis (1916–2006)**, la 19-an de februaro 2006, lia familio kaj geamikoj rememoris kun evidenta amo lian viglecon, humanecon kaj klerecon. Multaj homoj ŝuldas al li pro lia kuraĝiga subteno aŭ konsilo. Oni emfazis lian senfinan paciencon, honestecon kaj pacamon.

Eric estis dumviva vegeterano. Li estis militrifuzanto, sed pro sia profesio – termezuristo – li kunlaboris por rekonstrui Londonon post la bombado.

Li subtenis movadojn por mediprotektado kaj biologia agrikulturo, do oni povas diri, ke li estis ‘ĝisosta verdulo’. Inter liaj multaj aktivaj intereso estis ŝakludo, kantado, teatro, muziko kaj pentrado.

Eric flue parolis Esperanton kaj dum kvindek jaroj estis membro de la Londona Esperanto-Klubo. Li estis prezidanto de LEK de 1953 ĝis 1954, antaŭ ol li foriris al Afriko. Reveninte, Eric estis vic-prezidanto dum multaj jaroj. Li entuziasme partoprenis en lingvaj diskutoj, trafe deklamis poezion aŭ prozon dum distraj vesperoj, kaj kantis base en la ĥoro. En siaj tridekaj aĝojaroj Eric estis unu el la ĉefroluloj en kluba pantomimo *Infanoj en la arbaro*. Poste, en Barlastono, li kontribuis entuziasme al scendeseĝnado kaj reĝisorado dum *Ni Festivalu*.

Eric estis ĉefdirektoro de BEA Ltd, aktiva helpanto en la Universalaj Kongresoj en Londono kaj Brighton, kaj subtenis NoJEF. Ŝagajn konsilojn li proponis al EAB-komitato dum diskutoj pri la translokiĝo de la sidejo.

Eric lasis Londonon antaŭ kelkaj jaroj por loĝi pli proksime al sia filino en Hurstpeirpoint. Lia edzino Heather mortis pli frue. Ni kondolencas al filino Siân kaj filo Duncan. Kia viro, kia vivo!

Joyce Bunting

issue of the *Stone & Eccleshall Gazette* (p.35). It featured an interview by Christine Conlin with Paul Ĝubbins, 'who organises and tutors Esperanto courses at Wedgwood Memorial College'. The excellent, illustrated article included EAB's address and phone number.

• Esperanta futbalteamo

Esperanta futbalteamo volas kvalifigi por la Monda Pokalo en Sudafriko en 2010. Iniciatis la artistoj Olof Olsson kaj Daniel Salomon, kiuj kunlaboras sub la nomo La Loko.

La Loko uzas Esperanton en projektoj pri lingvo, kulturo, teritorio kaj ekonomio. Pli frue, ili lanĉis i.a. la Esperantan ĉenon de rapidmanĝejoj Ovo.

• Internacia Amikeca

Renkontiĝo, Aylesford, Kent (22–25 septembro). Informas Anica Page, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes MK8 9EP. Tel. 01908 564004; rete: terry-page@supanet.com.

Por lanĉi Esperantan futbalteamon, La Loko proponas al la ludantoj kaj la fervoruloj futbalon sen nacia ŝovinismo.

La Loko ĉeestis en Germanio dum la ĵusa Monda Pokalo kaj rekte lobios ĉe FIFA, kiel ankaŭ ĝiajn anojn kaj asociojn. Ĉi-somere la Esperanta futbalteamo ludis matĉojn en Kopenhago (20 majo) kaj Rejkjaviko (17 junio), ludos en Sarajevo (12 aŭgusto), kaj eble en Berlino en julio.

Por pliaj informoj kontaktu la informestrinon de La Loko en Berlino: Johanna Domke ĉe johanna@laloko.org, or +49 (0) 178 60 66 218; www.laloko.org.

• Esperanto features on Scottish Telugu website

Following the appearance of the first Telugu-language textbook for learning Esperanto, on sale at EAB, there is now a prominent page devoted to Esperanto on the website of the Telugu Association of Scotland, see www.teluguscot.co.uk. Telugu is an important language of south-east India, with some 40 million speakers. □

Membership

New Members

Terry Austin, Henley-on-Thames
Allan Bula, East Sussex
K. Dyke, Nottingham
Leslie Hunns, Southsea
S. Krasniqi, Croydon
Robert Longstaff, Guildford
Penelope Nicholas, Chichester
Mr Roberts, Blackheath
M.P. Stevens, London
Hannah Tellier, Ipswich
Andrew Weir, Dundee
Fiona Wright, Hastings

Completed the Free Postal Course

Brian Adams, Great Dunmow

Completed the Elementary Course


Rachel Bridgeland, Isle of Wight

Elementary exam

J. Fratoni (Merit)

Deceased

T. Moore, Peterborough
Bruno Najbaro, Yorkshire



Conversational Esperanto / Ĉiutaga Esperanto

A series of lively dialogues from everyday life by Don Lord. With illustrations by Peter Oliver.

• Don Lord, who learnt Esperanto in 1941 and celebrates his 80th birthday this year, has kindly given permission for EAB to publish his 'Ĉiutaga Esperanto' articles in book form: *Conversational Esperanto / Ĉiutaga Esperanto*. The articles originally appeared over the years in *La Brita Esperantisto* and (a few) in *EAB Update*, but have been arranged into categories and slightly edited for this edition.

• For those readers who are not already familiar with Don Lord's 'Ĉiutaga Esperanto', these are short texts, mostly dialogues, written in lively, everyday Esperanto and designed for learners who would like to improve their fluency. The topics covered are everyday ones, and the style is colloquial, but neither the vocabulary nor the grammar is simplified. However, even relatively inexperienced users of Esperanto can learn from them as the more difficult terms are followed by an English translation in brackets, and many of the texts also have notes.

• The book also includes a foreword by Marjorie Boulton and Esperanto–English and English–Esperanto vocabularies with page-number references to where the terms appear in context.

Don Lord: *Conversational Esperanto – Ĉiutaga Esperanto*. Barlaston: EAB, 2006. 200pp. Illus. A5. ISBN 0-902756-22-9. • **Order from EAB** for £9.00 + £1.35 (p.&p.) = £10.35. EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE or online at www.esperanto-gb.org.